**La babiladaj rondoj** okazas vendrede je la 19a horo. La gastiganto mem preparas simplan manĝaĵon (ĉefmanĝon kaj deserton). La invititoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Je la fino ĉiuj donacas monon al la gastiganto por kontribui al liaj elspezoj. Okaze de kunveno ĉe Espace Dickens ĉiu kontribuas ankaŭ al la lupago de la salono. (Fr 80.-).

**Aliĝu al unu aŭ la alia grupo perrete.**

"**Ambaŭ grupoj**" en Espace Dickens : **vendrede, la 15-an de septembro**, organizota de Charlotte, Marie-Antoinette kaj Knud.

### "Okcidenta grupo" :

**Ve, la 1-an de septembro**
ĉe Monique Golaz kaj Ĝiulio
r. Ecole de Commerce 3, Lausanne
079 754 21 60

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

### "Orienta grupo" :

**Ve, la 29-an de septembro**
ĉe Cléa Robin
ch. de Culat 20, Vouvry
024 481 33 06 / 079 330 04 03

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6

**La bazara budo** okazos sabate, la 26-an de aŭgusto, la 9-an kaj la 23-an de septembro sur la placo *La Palud*.
**Nepre aliĝu al**: http://doodle.com/poll/6hgepagnb58it434


## Laŭzana Esperanto - Societo

ĉe F. Randin - ch. de Vallombreuse 14 * CH - 1004 LAUSANNE
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 - Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

septembro 2017 – n° 07

Lunde, la 4-an de septembro 2017
Espace Dickens

## Rakontaĵoj pri la trasiberia vojaĝo trajna kaj la 102-a UK en Seulo.

La 8 laŭzanaj kongresanoj dividos siajn vidpunkton kaj memoraĵojn.

**Lunde, la 2-an de oktobro:** Projekcio de la filmoj: *Trasiberia trajno kaj 102-a UK en Seulo 2017.*

**Lunde, la 6-an de novembro:** *Decidota*

**Sabate, la 16-an de decembro:**
***Zamenhofa Festo*** *en Epalinges.*

## Penseto

Inter muso kaj muŝo estas nur ĉapeldiferenco, sed ne por la kato.



# Evento pri nia societo:

## **Jara ekskurso en Friburgo**

*Nia grupo kuniĝis la 17-an de junio pro sia tradicia ekskurso.*

Ni retroviĝis en la stacidomo de Laŭzano je la 8-a kaj forveturis al Friburgo.

Tie, sub blua cielo kaj varma suno, ni piediris ĝis la malnova urbo apud la katedralo. Post kafeo ni vizitis la muzeon "Gutenberg", kiu prezentas la historion de la presarto ek de ĝia komenco. Ni vidis multe da modeloj de metiejoj, la diversajn teknikojn de presado, komplikajn maŝinojn, ekde la plej maljunaj ĝis la plej freŝdataj. Tiu muzeo loĝas en belega malnova domo, kiu utilis kiel grenejo. Per granda pasio emerita printisto prezentis al ni la sekretojn de la tekniko, kvankam ni ne komprenis ĉion...

Post la tagmanĝo en la historia restoracio « Gothard » ni ankoraŭ vizitis la muzeon de la kudrilo kaj de strangegaj objektoj. Ni malkovris, kiom la homoj estis inventkapablaj antaŭ la uzo de la elektro por la ĉiutaga vivo. Tiel multe da iloj, kies uzadon oni ne povas imagi sen la klarigo de nia cicerono, kiu, ankaŭ tie, montris multe da pasio por prezenti sian ĉarman muzeon, kiu situas en patricia domo de la Grand-Rue !

Reirante al Laŭzano, ĉiu estis kontentega de la tago, de la malkovroj kaj de la ĉiam agrabla etoso.

## **Festivalo en Martigny**

La 23-an kaj la 24-an de junio okazis la jara festivalo de la 5 kontinentoj en Martigny, kie ni starigis nian tendon por prezenti Esperanton. Ni faris tion por subteni la freŝnaskitan valezan grupon. En tiu festivalo multe da budoj estis destinataj al vestaĵoj de Azio, Afriko kaj Sudameriko, kaj diversaj ekzotikaj manĝaĵoj estis proponitaj sur la placo. Sur scenejo ludis pluraj muzikistoj, ĉefe por la infanoj. Vendrede venis ne multe da interesuloj... sed sabate pli multe da vizitantoj haltis ĉe la valeza budo kaj interesiĝis pri la internacia lingvo. Ni bondeziras sukceson al la freŝdata valeza grupo sub la iniciato de Christian Darbellay.

## **Konkurso "Teo kaj Amo"**

La filmkonkurso organizita de *Ĉina Radio Internacia en 2016* ricevis - komence de 2017 - 77 filmetojn el 27 landoj. Kelkaj membroj de nia Societo partoprenis kaj aktoris en la filmo "Tetaso amas vojaĝi", kiu estis sendita al Ĉinio. Nia realigaĵo montrante pejzaĝojn de nia regiono ĉirkaŭ la plezuro trinki teon el taso dekorata per verda stelo tre plaĉis al la ĵurio kaj al la interretanoj.

Dum la 102-a Universala Kongreso 2017 en Seulo, nia reĝisoro estis dufoje petita veni sur la scenejon por ricevi premiojn por la kvalito de nia filmo: kiel la plej bona realigaĵo, la plej bona scenaro, la plej bonaj bildoj kaj la plej bona muntado !

Pro tio, Francisko Randin estas invitota oktobre en Ĉinio por festi tiun eventon kaj partopreni la Festivalon "Teo kaj Amo". Ni gratulas ĉiuj pro tiu rezulto kaj speciale nia filmisto, kiu estas la "patro" kaj la motoro de tiu realigaĵo.